Nu kiel fartas vi amik’

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Nu, kiel fartas vi amik’, nu, kiel fartas?
Ĉu ne forgesis kiel brig’ de bordo startas?
Ĉu vi memoras kiel ni vivis libere?
En mondo regis harmoni, en ni – espero?

La tuta viv’ atendis nin kaj tiam ŝajnis,
ke tridekjaro estas fin’ por viva trajno.
Ke estos hela horizont’ dum multaj jaroj
kaj ne vizitos nin bezon’ kaj la eraroj.

Ni multon havis por feliĉ’, por nia famo.
Kaj ne ekzistis superstiĉ’ por ni krom amo.
Jes, nun aliaj estas ni, sed malgraû tio
Mi amas vin, vi amas min, kaj amos ĉiam.

Nu, kiel fartas vi amik’ novaĵoj kiaj?
Delonge ne ricevis mi leterojn viajn.